

Ora Ĵurnalo

Numero 37, Februaro 2021



"Palmhuset/La domo de palmoj", la printempa atendejo.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo	2	IT-veroj	21
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Epizodo el eta ĉina urbo	22
Espeporko meditas.....	3	Bonvesperon jen invit'	23
La Ĝardena Asocio de Gotenburgo.....	4	Ole Therkelsen, Esperanto kaj la Kosmologio de Martinus.....	24
OM VIKINGAR – komentario kaj raktelo	4	Pri revo, realo kaj etoso en Svedio.....	25
La unua libroronda reta kunveno.....	5	Maristo Jansson.....	26
UEA anoncis ke Ora Ĵurnalo estas atingebla ..	8	Ĉirkaŭ ulo de Luossa.....	26
La sama nacia tago, la 6an de februaro.....	9	INK-konkurso	27
Eble nova kunlaboranto de Ora Ĵurnalo!.....	9	Greziljono.....	27
Internacia edukado kaj scienca kunlaboro...11		La dua parto de alfabeto ludilo de Inga.....	28
La 27an de januaro, la memortago de la ekstermado de judoj	12	Ne krokodilo!	29
Anoncoj pri morto en Göteborgs-Posten, la 31an de januaro	14	La krokodilo	30
La Dinastio Broström en Gotenburgo.....	15	Esperanta poetika retejo el Islando	31
La stilo de la renesanco	16	Odiseo	31
Vintra mateno	19	Islandaj aforismoj.....	31
Ne Rapidigu!	19	Eta vizito en Stokholmo	32
Malnova Parfumujo	20	Kiu estas Sankta Luĉio?.....	34
”Anekdotoj pri Gabrovanoj”	20	Teksto de Luĉiokanto	38
		Esperantaj proverboj.....	38

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj

Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com.

Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





Espeporko meditas

- ☆ **Februaro** estas ja la plej mallonga monato de la jaro. La romia kalendaro komenciĝis per marto, kaj la kalendaro enhavis 10 monatojn – decembro estis la deka. La periodo januaro – februaro oni nur nomis "vintro" ĝis romia reĝo ĉirkaŭ 700 a.Kr enmetis la monatojn januaro kaj februaro. En la jaro 153 a.Kr januaro estis la unua monato kaj decembro la 12a. La nomo februaro venas de la roma dio Februarius, kiu siavice venas de la etruska dio Februus. Do, mallonga monato havas longan historion aparte pri la supermonato, kiu sekvis post februaro, sed nun nur estas supertago, ĉiun kvaran jaron.
- ☆ **Poemoj** abundas en nia magazino. La plej longan verkis Zamenhof mem. El la libro "Poemo" de Lenke Szász ni legos tri poemojn en ĉi tiu numero. Se vi volus la tutan libreton, nia biblioteko havas 2–3 ekstrajn ekzemplerojn. Ankaŭ de la libroronda libro "**Sesdek ok**" ni povas vendi kvin ekzemplerojn.
- ☆ 11 personoj ja partoprenas en **la librorondo**, kiu havis sian unuan retan kunvenon la 31an de januaro – preskaŭ sen teknikaj problemoj. Ni uzis Google Meet.
- ☆ Ke **interretaj aferoj povas esti amuzaj** – Lasse Granat montras al ni.
- ☆ La **sameoj** en Svedio, Norvegio, Finnlando kaj Rusio celebris sian nacian tagon la 6an de februaro. Alia minoritato estas ja la romaoj – aŭ la **ciganoj**, kiu laŭ Andrzej

estas la ĝusta nomo. Romaoj estas nur parto de la pli granda cigana popolo.

- ☆ Almenaŭ gotenburganoj devas scii pri la **ŝipposedanta familio Broström**. En tri numeroj Ingegerd rakontas ilian streĉan historion. Ne maltrafu tion!
- ☆ La dua parto de la **alfabeta ludilo** de Inga nun troviĝas. Ŝparu ĝin ĝis vi mem gvidos esperantan kurson!
- ☆ La esperantoklubo en Gotenburgo preparas sin por partopreno en **ekspozicio** de Tidningsverkstan. Ĝi okazos en la gubernioj de Bohuslando kaj Kalmar.
- ☆ **Eraroj** en Ora Ĵurnalo de tempo al tempo okazas. Ĉi tiun fojon estis mi kiu en la pasinta numero erare datigis la alvenon de vikingoj al Ameriko. Hmmm... ciferojn mi ofte malbone traktas. Krome – ĉu ne estas Einstein kiu diris ke tempo kaj ejo fakte ne ekzistas.... nu, mi ne senkulpigu min! Kaj tempon kaj ejon oni bezonas sur la tero.
- ☆ **La lumo estas survoje!** Iomete tro malfrue – aŭ tro frue, ni legos pri Sankta Luĉio, verkita de Kerstin Rohdin. Estos interese havi komenton de iu leganto en lando for de Svedio. Kion vi pensas pri la sunkulto en Svedio?
- ☆ Ankaŭ estas survoje dozoj da **vakinio** ... ne, ne!, dozoj de **vakcino**... estas survoje. Eltenu!

Fartu bone!

/Siv





Palmhuset i Trädgårdsföreningen, Göteborg

La Ĝardena Asocio de Gotenburgo

estas unu el la plej bone konservitaj parkoj de la 19a jarcento.

Somere en **Rosariet** miloj da rozoj abundas.

La eleganta vitrodomo de 1878, **Palmhuset**, enhavas palmojn kaj aliajn ekzotikajn kreskaĵojn. Sur areo de preskaŭ 1000

kvadrataj metroj vi povas ĝui varmon, eĉ tropikan, sed vintre la domo bedaŭrinde estas fermita. Estas kvin sekcioj: la Palmdomo, la Mediteranea domo, la Kamelia domo, la Tropika domo kaj la Akva domo. La klimato en la sekcioj estas adaptita al la kreskaĵoj tie.



OM VIKINGAR – kommentar och rättelse

av Roger Nilsson

Gäller artikel i januarinumret:

Hej, Siv

Det ser ut som om Amerika upptäcktes av vikingarna år 793 enligt din artikel. Jag tror inte du menade detta. År 793 anfölls klostret

i Lindisfarne där vikingarna rövade värdefullt material och slog ihjäl munkarna. Detta räknas som start av Vikingatiden. Nya fynd, framförallt i Östersjön, tyder dock på att vikingatiden började många år tidigare. Amerika upptäcktes (troligen eller kanske

med all säkerhet) år 1000 av Leif Eriksson. Förutom röveri ägnade sig vikingarna åt handel (tyvärr också slavhandel) och uppbyggnad och skapande av flera städer runt om i Europa. En del vikingar som tog

tjänst hos kalifen i Istanbul kallades varingar. Våra nordiska gener spreds därmed runt om i Europa.

Roger

La unua libroronda reta kunveno iniciatita de Ingegerd Granat

La 31an de Januaro okazis la unua libroronda Google-Meet kunveno kun 11 partoprenantoj. Ni legis duonon de la unua ĉapitro de "Sesdek ok" verkita de Sten Johansson. Temas pri la travivaĵoj de 20-jara junulo dum la eventoplenaj jaroj ĉirkaŭ 1968. Li direktas sin al iu Ingrid, pri kiu ni ankoraŭ scias nenion. Ni diskutis pri la kanto "La Internacia" kun instigo al mortbatalo. Ĝi troviĝas komence de la unua ĉapitro. Ĉu nur vortoj aŭ reala minaco? Ĉu la klasbatalo ankoraŭ estas realo? En kiuj landoj? Jes ankoraŭ troviĝas, sed ne tre videbla ĉi tie.



Kerstin Rohdin donis al ni faktojn pri sia onklo Olle Olsson (pri li – legu pli malsupre), kiu estis menciita en la teksto. Li gvidis esperantajn kursojn en Skanio kaj avertis al siaj kursanoj kontraŭ uzo de "adasismo", nova vorto – almenaŭ por mi. Temas pri la emo fari poemojn uzante sufiksojn kiel "adas" por krei rimajn poemojn (legadas, skribadas).

Alia interesa vorto estas "flavbekulo". Ĉu ĝi signifas "komencanto" aŭ ion plian? La

librorondo ja ankaŭ funkcias kiel leciono. Ni lernas novajn vortojn, novajn esprimojn. Ni aŭskultas kaj diskutas. Sekvos multaj dimanĉaj vesperoj kun "Sesdek ok".

Unu diskutinda temo estis pri **esperantistaj elstaraj "frontfiguroj"**. Kaj **Ann-Louise** kaj mi ĉeestis studsemestrojn en la popolaltlernejo de Karlskoga en 1998 kaj 2000 respektive kun **Lars Forsman** kiel instruisto. Li tre gravis por ni kaj por la evoluo de esperanto. La partoprenantoj venis el multaj landoj.



Pri Lars Forsman Vikipedio skribas:

Lars FORSMAN (naskiĝis en 1938) estas sveda esperantisto, instruisto pri lingvoj kaj rektoro de la Sveda Esperanto-Instituto.

En la universitatoj Uppsala kaj Lund li studis la germanan kaj anglan lingvojn, pedagogion, fonetikon kaj lingvistikon. Dank' al lia studado pri lingvaj laboratorioj li ricevis postenon en la Popola Altlernejo de Karlskoga. La lernejo

preparis novan konstruaĵon kaj li fariĝis ĉefinstruisto pri lingvoj. Tiutempe li kompilis multe da ekzercoj por uzado en lingvolaboratorioj.

Pri la kialo ke Lars komencis studi

esperanton. Iam Zofia Fornalova vizitis lian lernejon kaj li, tute senklara pri Esperanto, aŭskultis mirigita la prelegon en Esperanto pri Ludoviko Zamenhof kaj lia lingvo. Kerstin Rohdin tradukis kaj post kelkaj jaroj ŝi finfine igis la entuziasmulon ekstudi. En anglajn lecionojn li enkondukis instruadon de Esperanto.

Kaj poste:

[...] naskiĝis la Esperantofako kun kvarmonataj kursoj, studantoj el 39 landoj entute kaj kelkaj iris de nul ĝis la internacia ekzameno de la lernejo. La studado ampleksas 25 lecionojn semajne inkluzive la lingvo-laboratorion. Komunaj manĝoj, kiam nur Esperanto funkciis, kunaj vesperoj,

lecionoj, invititaj prelegantoj, kantado, hejmlaboraj taskoj kaj tiam kaj tiam ekskursoj, kie ili mem ofte prelegetis. Iu iam diris: "La plej fruktodonaj kursoj estas la ekskursoj".

Paulina Jot, la juna prezidantino de la pola esperanto-asocio "Toronto" multe kontribuis al la diskuto kaj malebligis al ni paroli svede. Bonege!

Ŝia propono pri pola "frontfiguro" estas **Antoni Grabowski**, kiu vivis en la tempoj de L.L. Zamenhof. Li jam delonge interesiĝis pri diversaj lingvoj kaj kiam Zamenhof publikigis la unuan libron, li tuj lernis esperanton kaj persone vizitis Ludovikon. Estis li kiu faris la unuan interparolon en la mondo en esperanto – kun Zamenhof kompreneble. Poste li multe kontribuis al la evoluo de la lingvo, tradukis multajn verkojn kaj aktive agadis.



El Vikipedio:

Antoni GRABOWSKI (naskiĝis en 1857 en la vilaĝo Nowe Dobra/Neuguth apud Culm an der Weichsel (hodiaŭ Chełmno), kaj mortis en prusa ŝtataneco kaj frua Esperanto-aktivulo, kiu precipe per siaj tradukoj grave influis la evoluon de la Esperanta literatura lingvo.

Pri Olle Olsson el Vikipedio:

Olle OLSSON naskiĝis en 1909, mortis en 2003. Li estis sveda esperantisto, honora membro de UEA kaj de ILEI en Svedio.

Esperanton li lernis fine de la 1920-aj jaroj kune kun sia frato Nils Olsson. En 1930 li fondis E-klubon de Lund (kies honora membro li fariĝis en 1936). Poste li kreis Studentan Klubon de Lund, kaj li prizorgis ĝin preskaŭ ĝis sia morto. Eĉ dum siaj lastaj jaroj

en hejmo por maljunuloj li gvidis esperantokursojn. Kiel profesia instruisto li gvidis multajn E-kursojn kaj estis unu el la pioniroj de ILEI. De 1965 ĝis 1982 li plenumis la taskojn unue kiel dua sekretario kaj ekde 1974 kiel kasisto de ILEI. Dum multaj jaroj li estris la Svedan sekcion de ILEI. Por helpi junulojn partopreni en internaciaj aranĝoj li kreis kun aŭstria donacinto Fondaĵon Erika Linz.

Li estis estrarano de la Sveda Sekcio de KELI, kelkare kiel prezidanto, kaj li estis prezidanto de Suda Distrikto de Sveda Esperanto Federacio 1963–1983. Dum tiuj jaroj la laboro estis tre vigla kun kunvenoj, seminarioj kaj kursoj.

Dum jardekoj li kunaranĝis Dan-Svedajn Tagojn. Li heredigis monon al Fonduso Olle Olsson por informo kaj disvastigo de Esperanto.



Bildo de 1970, kiam la Esperantoklubo de Lund kaj la Skania Distrikto kune celebris siajn 40-an resp. 35an jubileojn.

Dekstre staras Olle Olsson.

Rimarku: La prezidanto estas ino! Dum kelkaj jaroj ŝi ankaŭ estis la prezidantino de SEF. Ni konas ŝin kiel Karin Lindqvist. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi forpasis.

Kerstin pri Jan Strönne:

“Dan-Sveda Tago” estis dum plurdeko da jaroj interesa ekskurstago por danaj kaj sudsvedaj esperantistoj. Li organizis dum kelkaj jaroj post la dua mondmilito la gravan renkontiĝon SSS, Sveda Somera Semajno. Ĝi kolektis grupon de esperantistoj el diversaj landoj, kiuj kreis novan vivon en la postmilita esperantomovado.

Krome li estis multjara prezidanto de SEF kaj estrarano de UEA, sed tio estas alia rakonto. Jan tre multe kontribuis al la esperanta movado. La kluboj en “Malmö/Lund/Skanio” kaj “Kopenhago/ Danio” havis multjaran kunlaboron, i.a. la turisma plurdekjara kunlaboro “Dan-sveda Tago” gravis. *Kerstin*



Alia diskuttemo estis: Ĉu la esperanta movado estas egaleca hodiaŭ?

Sur malnovaj fotoj viroj plimultas. Paulina rimarkis ke nun la prezidantoj de multaj esperanto-kluboj estas prezidantinoj, ekz. en Pollando kaj Svedio.

Kerstin donas bonan ekzemplon de grandinflua virino: Anna Adamo Sandgren.

Pri Anna Alamo Sandgren de Kerstin Rohdin:

Ankaŭ virinoj ludis gravan rolon en la esperantomovado post la milito. **Anna Alamo Sandgren** vojaĝis inter esperantogrupoj en Eŭropo por helpi ilin pri esperantolaboro kaj postmilita helpo ekz. pri manĝo kaj alia postmilita helpo. Anna Alamo estis vigla kaj energia ĝis alta aĝo.

Ŝi partoprenis semajnfinan esperantokunvenon en TEDU-regiono, kie

prelegis **Elsbet Bormann de Hamburg**. (Ŝi gvidis porvirina laborgrupo de UEA.) Elsbet membris sian lernejan tempon, kiam Anna Alamo venis al ŝia lernejo kaj disdonis manĝon al la gelernantoj. Malbonŝance tiun tagon oni disdonis salajn haringojn, kiuj donis stomakdoloron al la lernantoj. Kia renkontiĝo preskaŭ 60 jaroj pli poste en Esperantio!

Alia rakonto pri la energia Anna Alamo: Antaŭ multaj jaroj mi partoprenis renkontiĝon en

El Vikipedio:

Anna ALAMO-SANDGREN (1907–1998) estis dumviva membro de UEA, delegito pri kristanismo en Östansjö (Svedio). Ŝi prezidis (1944–48) la svedan sekcion de Kristana E-Ligo Internacia (KELI) kaj de 1947 faris, kiel "vojaĝanta sekretariino" de tiu sekcio, pli ol 2500 prelegojn en aŭ pri Esperanto en Svedio kaj alilande. Ekde 1955 ŝi estis longtempe estrarano de KELI.



Kroatio. Maljuna virino demandis min de kiu lando mi venas. "Svedio" mi diris. Ŝi demandis: "Ĉu vi konas Anna Alamo"? Mi diris "Jes". "Oh kiel bone. Ŝi estis mia esperantoinstruistino post la milito." Dum siaj lastaj jaroj en la vivo ŝi gvidis junularan grupon kaj kreis muzikdiskojn. Esperantistoj renkontiĝas ĉie en la mondo! *Kerstin*

Kerstin ankaŭ rimarkas ke la familia nomo Alamo fakte estas "Al amo".



Jen bildo post la kunveno: De maldekstre: Ingegerd, Siv, Lasse kaj Andreas.

La venonta kunveno estos la 28an de februaro je 17h. (Bedaŭrinde ne loko por pliaj partoprenantoj.)

/Siv

UEA anoncis ke Ora Ĵurnalo estas atingebla



"Universala Esperanto-Asocio

Ora Ĵurnalo estas publikigaĵo de Esperanto-Societo de Gotenburgo (Göteborgs Esperantoförening). La nova numero ĵus aperis. Subtene al la laboro de lokaj aktivuloj, UEA invitas legemulojn ĝin ĝui per la ligilo: [...]. Ni gratulas kaj deziras bonan laboron al gotenburganoj!"

Dankon al UEA!

La samea nacia tago, la 6an de februaro

Por la gotenburga societo Johannes Marainen estas konata. Li prelegis dum niaj "Esperantaj Sabatoj" pri sia junaĝo en samea vilaĝo. Liaj gepatroj bredis boacojn. Tamen Johannes elektis translokiĝi al Gotenburgo por havi edukadon kiel instruisto pri la sveda kaj historio. Krom la profesio li ankaŭ esploris la samean historion, kiu havas malhelajn elementojn. La sveda ŝtato ne toleris minoritatajn lingvojn je tiu tempo. Oni ŝanĝis la sameajn nomojn de infanoj al svedaj nomoj kaj estis malpermesite – eĉ dum la paŭzoj – paroli la samean en la lernejoj. En la norda parto de Svedio sameoj estis rigardataj malestime, sed en la sudaj partoj kiel ekzotikaj homoj. Ĉar multaj sameoj volis protekti siajn infanojn de malestimeco ili ne instruis ilin en la samea. Nun kelkaj el la sameaj lingvoj malkreskas – bedaŭrinde. Sed la nacian tagon estas celebrata de sameoj en Svedio, Norvegio, Finnlando kaj Rusio.

La libro en la manoj de Johannes temas pri sameaj familioj: Karesuando samesläkter. Ĝi estas nova versio, reviziita eldono de libro kun la sama titolo de 1997.

Se vi bezonas inspiron preleganton – elektu Johannes! /Siv



Eble nova kunlaboranto de Ora Ĵurnalo!



Andrzej Boguslaw Lewkowicz serĉis rete kaj trovis libron en nia biblioteko. Ĉar temas pri sufiĉe rara libro ni ne vendos ĝin sed ni faris retan kopion al li (la libro ne havas kopi-malpermeson).

Do, tio estis la unua kontakto. Lingvoj ja ĉiam interesas min kaj Andrzej parolas tre multajn – ne nur la plej oftajn. Unue mi volas ke li prezentu sin:

” Mi neniam revis labori kun lingvoj profesie. Ĝi estis akcidento.

Mi naskiĝis en nordorienta Pollando. Antaŭ la lasta mondmilito loĝis tie la germanoj.

Post la milito preskaŭ ĉiuj germanoj fuĝis, kaj anstataŭ ili venis enmigrintoj el Litovio, Belorusujo, Ukrainio kaj Rusujo. Mi naskiĝis 15 jarojn post la milito, sed ne ĉiuj elmigrintoj sciis bone la polan lingvon. Mi havis amikojn en mia klaso, kiuj malbone konis polan. Mi helpis al ili pli bone paroli pole, kaj ili instruis al mi la rusan, la ciganan, la litovan kaj la jidan lingvojn.

Hejme ni parolis germane. Kiam mi estis 12-jara knabo mi kompletigis (en koresponda kurso) ankaŭ Esperanton. Ses jarojn poste mi sukcesis la ekzamenon por Esperanto-instruistoj, mi partoprenis ankaŭ en Nederlando en la kurso por Esperanto-instruistoj, kiuj volis instrui esperanton laŭ Csech-metodo.

Mi studis multajn lingvojn kaj en mezlernejo mi decidis studi hindajn kaj iranajn lingvojn por pli bone prepari min mem al estontecaj studoj de la cigana lingvo, kiu apartenas al la grupo de novaj hindaj lingvoj. De multaj jaroj mi instruis ciganan filologion en pluraj universitatoj. Poste mi kreis instituton de la cigana lingvo, kie mi daŭre esploris ĉi tiun lingvon.

Mi uzas la esprimon "cigana lingvo" (ne romaa lingvo), ĉar romaoj estas nur unu grupo inter la ciganoj. Krom la romaoj, ekzistas ankaŭ manush, sinti, calo, resande kaj aliaj grupoj, kiuj ne volas esti nomataj romaoj. La ĝenerala nomo por ĉiuj grupoj estas ciganoj. En Svedujo oni obstine uzas nur la nomon romaoj, sed tio estas malĝusta por neromaaj grupoj. Ja en Svedujo vivas ankaŭ resande kaj kaale.

Multe da ciganaĵoj esperis ke sufiĉas ŝanĝi la nomon de ciganoj al romaoj. Ĉi tio kompreneble ne veras. Ekzemple en Ĉeĥujo ni povas tre ofte renkonti skribojn sur la muroj de domoj: Romové do Indie! (Ciganoj al Hindujo!) Ciganoj devas pene labori por ŝanĝi sian bildon. Ĉi tio montras, ke la nova nomo de ciganoj ŝanĝis nenion.

En Svedio oni adoptis la principon, ke statuso de la minoritata lingvo estas nur donita al tiuj lingvoj, kiuj estas uzataj en Svedio dum almenaŭ 500 jaroj de komunumoj (ne de individualaj personoj). Tial, nur 5 lingvoj estas agnoskitaj kiel minoritataj lingvoj (finna, meänkieli, jida, cigana kaj samea). Juro estas unu problemo, kaj socia praktiko estas alia problemo.

Do en la kazo de Esperanto kaj signolingvo, ni povas trakti uzantoj de tiuj ĉi lingvoj kiel apartaj sociajn grupojn, kiuj povus ricevi subtenon de la ŝtato por disvolvo de siaj lingvoj. Sed ĉi tie ni eniras la kampon de politiko, bedaŭrinde Esperanto estas ankoraŭ traktata kiel "danĝera" lingvo kaj neniu volas ĝin.

Esperantistoj havis problemojn en nazia Germanio, en stalinisma Sovetunio, Esperanton oni ankaŭ ne volas en la Eŭropa Unio. En tia situacio, la Esperanto-movado dependas nur de siaj propraj membroj kaj de la laboro de volontuloj. Esperanto-aktivuloj meritas grandan respekton por sia persista laboro. *Andrzej*

Mi vere ĝojas ke Andrzej rakontas pri siaj travivaĵoj en la multlingva mondo.

Estu bonvena Andrzej! Nun mi eĉ povas literumi vian polan nomon. Antaŭ ol ni havis kontakton kun la esperantistoj en Gdansk mi pensis ke la literumo estus malfacila kun multaj superfluaĵoj literoj. Sed estas ja parto de la kulturo.

Ankaŭ la sveda havas superfluaĵojn literojn kaj nelogikan literumon. Ekz. la vorto "väsentlig" ja estas eldirata "vesäntlig". Iam mi havis rektoron kiu propagandis pri literuma reformo. Ekz. li skribis artikolon komencante per: "Tjära Kålega". Por legantoj estis multe pli peniga legi la logikan skribon ol ion kun la kutima literumo. Strange! /Siv

Internacia edukado kaj scienca kunlaboro

de Andrzej B. Lewkowicz



En 1951, ses eŭropaj landoj (Belgio, Francio, Nederlando, Luksemburgio, Okcidenta Germanujo kaj Italio) subskribis la Parizan Traktaton starigantan internacian ekonomian organizon nomatan Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo. Kelkajn jarojn poste, en 1957, ĉi tiu organizo fariĝis Eŭropa Ekonomia Komunumo. Ĉi tiu unuiĝo de Eŭropo okazis ne nur sur la ekonomia nivelo. Krom la komuna ekonomia merkato, estis kreitaj ankaŭ la Eŭropa Kortumo, la Eŭropa Parlamenta Asembleo kaj la Eŭropa Komunumo pri la Atomenergio. En 1973 Britio, Danio kaj Irlando aliĝis al EEK. En 1979 enkondukiĝis la komuna valuto écu (ang. European Currency Unit), kiu poste transformiĝis je la eŭro. Kaj en 1981, pli da landoj (Hispanio kaj Portugalio) aliĝis al la EEK. Tiam oni jam sciis, ke la procezo de plua unuiĝo de la Eŭropo estas neevitebla. Des pli ĉar Okcidenta Eŭropo havis konkuranton en la formo de la komunisma ekonomia bloko, kiu estis Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpo. En la 1993 EEK transformiĝis al la Eŭropa Unio. Svedio, Finnlando kaj Aŭstrio aliĝis al la Unio en la 1995. En la 2000-aj jaroj aliĝis al la Unio sekve 13 landoj.

La procezo de unuiĝo kovris pli kaj pli da landoj kaj pli kaj pli da vivaj areoj. Oni komprenis la bezonon unuiĝi ankaŭ la edukan sistemon en unuiĝinta Eŭropo. Estis planite krei komunajn instruplanojn, gradigan sistemon, ĉar edukado en bazlernejoj kaj mezlernejoj daŭre estis malsamaj en unuopaj landoj. Dilemo aperis, ĉu diplomiĝintoj en mezlernejo havas sciojn je simila nivelo. Diplomiĝintoj de altlernejoj ricevis diversajn akademian titolojn. Ĉio postulis normigon, des pli ke la studenta

interŝanĝo komenciĝis. Junuloj tre ofte elektis universitatojn en unu el la eŭropaj landoj. Esploristoj ankaŭ serĉas laboron en aliaj landoj. Ankaŭ diskutis, kiun lingvon uzi en la internacia edukado kaj studoj en unuiĝinta Eŭropo.

Ĉi tiujn problemojn tre klare vidis viziuloj, kiuj ne mankis en la Esperanto-movado. Profesoroj Helmar G. Frank, Reinhard Selten el Germanio kaj Hemphrey Tonkin el Usono kreis internacian instruan projekton baze de Esperanto. Tiel fondiĝis la **Akademio Internacia de la Sciencoj** kaj ĝi estis registrita en San-Marino en la 1985. Kial ĝuste tie? Ĉi tiu malgranda respubliko en Italio havas la plej demokratian sistemon en Eŭropo. En ĝeneralaj elektoj, la loĝantoj de ĉi tiu lando elektas Grandan Ĝeneralan Konsilion, kiu nomumas du kapitanojn-regantojn, kiuj kune estras la landon.

AIS ne havas konstantan sidejon. Estas filioj de ĉi tiu akademio ĉe diversaj eŭropaj universitatoj. La prelegantoj de la akademio estas sciencistoj el la tuta mondo, kiuj konas Esperanton. Ĉiujare oni organizas sciencajn sesiojn en diversaj eŭropaj landoj, dum kiuj okazas prelegoj kaj ekzamenoj.

La AIS adoptis dividon de sciencoj netipa por plej multaj universitatoj en la mondo. La Akademio dividas la sciencojn laŭ sistemo proponita de filozofoj W. Windelband kaj K. Poper. Sekve, AIS havas ses fakultatojn; pri cibernetiko, antroposciencoj, struktursciencoj, filozofio, natursciencoj kaj morfosciencoj. La Akademio aljuĝas siajn diplomiĝintojn kun la bakalaŭra, majstra kaj doktora titoloj. Ĝi ankaŭ agnoskas la titolojn donitajn de aliaj altlernejoj.

La akademio preferas interfakajn studojn. Kompreneble, oni povas studi nur matematikon. Sed multe pli grandaj ebloj alfrontas studenton, kiu studas matematikon ekzemple kune kun fiziko.

La AIS, krom la scienca fakoj, teknologia kaj arta ankaŭ havas fakon por financa subteno. La tasko de ĉi tiu fakoj estas enspezi financojn por la agadoj de la akademio.

La akademio estis tre populara en la 90-aj jaroj en Orienta kaj Okcidenta Eŭropo. Post la falo de komunismo en Centra kaj Orienta Eŭropo, junuloj ricevis la ŝancon studi en Okcidento, kaj ili multe profitis ĝin. Esperanta junularo ankaŭ. Svedoj ankaŭ studis en la akademio, kaj sveda matematikisto prof. Ch. Kiselman el Upsalo estas ĝia plena profesoro. La AIS nuntempe havas kelkcent sciencajn personojn kaj organizas sciencajn kunsidojn


ĉiujare. Eble la nuna covid-19 pandemio devigos akademion tute ŝanĝi lernadon al distanca sistemo, kiu havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Tamen mi kredas, ke la AIS daŭros. Ĝi havas gravan kaj bezonatan mision por plenumi.

Verdire la Eŭropa Unio ankoraŭ estas nur dogana unio. Estas malfacile por eŭropaj landoj disvolvi komunan eksteran politikon, komunan juran sistemon, ktp. Ankaŭ ĝis nun ne eblis unuigi la edukadon. Individuaj eŭropaj landoj ankoraŭ uzas proceduron de agnosko de diplomoj akiritaj en alia lando anstataŭe akcepti ĝin ktp. Sekve, la ekzisto de AIS ankoraŭ necesas, ĉar ĉi tiu akademio konstante memorigas nin, ke unuiĝo de Eŭropo en kampo de la edukado kaj scienca kunlaboro estas nefinita verko.

La 27an de januaro, la memortago de la ekstermado de judoj

Inga Johansson trovis ĉi tiujn paĝojn interrete:

<https://www.youtube.com/watch?v=0Ur5RaY7rGY>



Okaze de la Tago de la memoro pri la viktimoj de la holokaŭsto, ni publikigas la prelegon de Michael Vrazitulis:

“Pogromoj kontraŭ judoj, la estiĝo de Esperanto kaj la sorto de la familio Zamenhof” okazinta rete la 9-an de novembro 2020.

Antaŭ 82 jaroj, en la nokto de la 9a al la 10a de novembro 1938, la nazioj en Germanio detruis milojn da sinagogoj, judaj vendejoj kaj loĝejoj en la tuta lando. Sole dum tiu nokto, 400 judaj homoj estis murditaj, kaj 30.000 judaj viroj estis arestitaj kaj enkarcerigitaj en koncentrejoj.

Tiu traŭmatiga sperto por la juda komunumo en Germanio finfine montriĝis nur preludo al la plej terura genocido en homa historio, la industria amasmurdado de pli ol 6.000.000 da judoj el tuta Eŭropo.

La ideologio, kiu instigis homojn al tiuj nekompreneblaj kaj nepardoneblaj agoj, estas antisemitismo. Indas konscii pri tio, kiel ĝi evoluiĝis el ĝin antaŭantaj formoj de diskriminacio kontraŭ judoj kaj kio ĝin distingas de aliaj formoj de kontraŭhoma malamo surbaze de supozataj rasaj kriterioj.

Ankaŭ gravas konsideri la fakton, ke pogromoj kontraŭ judoj jam antaŭ la

barbaraĵoj de nazia Germanio havis longan tradicion en tuta Eŭropo. Ofte kaj facile forgesblas, ke ankaŭ la juna, juddevena Ludwik Lejzer Zamenhof, tiam ankoraŭ kreonto de la internacia lingvo Esperanto, devis mem sperti la ondon de kontraŭjudaj pogromoj en la Rusa Imperio dum la 1880aj jaroj.

Estis precipe tiu sperto de violenta diskriminacio, kiu motivigis lian ideologian evoluon unue al cionismo kaj poste al internaciismaj ideoj. Eble L. L. Zamenhof konsidereblas bonŝanca pro tio, ke li ne plu povis ekscii, kia amara sorto trafos ĉiujn siajn tri gefilojn.

Ni, hodiaŭ, ja scias. Ni respondecas pri tio, ke ni ne plu donu spacon al diskriminacio en niaj socioj; precipe en la nuna tempo, kiam ĉirkaŭ la mondo la kvanto de perfortaj agoj kontraŭ homoj pro antisemitismaj, rasismaj, seksismaj, homofobiaj k.a. motivoj zorgige kreskas.

La prelego estis dulingva, esperante kaj angle. Temas pri kunlabora projekto inter TEJO kaj la Germana Esperanto-Junularo.

Jena poemo de Zamenhof unue aperis en la jaro 1889 en La Esperantisto, la unua periodaĵo en la internacia lingvo Esperanto.

1. Forte ni staru, fratoj amataj,
por nia sankta afero!
Ni bataladu kune tenataj
per unu bela espero!

2. Regas ankoraŭ nokto sen luno,
la mondo dormas obstine,
sed jam leviĝos baldaŭ la suno,
por lumi, brili senfine.

3. Veku, ho veku, veku konstante,
ne timu ridon, insulton!
Voku, ho voku, ripetadante,
ĝis vi atingos aŭskulton!

4. Dekon da fojoj vane perdiĝos
la voko via ridata, –
la dekunua alradikiĝos,
kaj kreskos frukto benata.

5. Tre malproksime ĉiuj ni staras
la unuj de la aliaj...
Kie vi estas, kion vi faras,
ho, karaj fratoj vi miaj?

6. Vi en la urbo, vi en urbeto,
en la malgranda vilaĝo,
ĉu ne forflugis kiel bloveto
la tuta via kuraĝo?

7. Ĉu vi sukcese en via loko
kondukas nian aferon,
aŭ eksilentis jam via voko,
vi lacaj perdis esperon?

8. Iras senhalte via laboro
honeste kaj esperante?
Brulas la flamo en via koro
neniam malfortiĝante?

9. Forte ni staru, brave laboru,
kuraĝe, ho nia rondo!
Nia afero kresku kaj floru
per ni en tuta la mondo!

10. Ni ĝin kondukos ne ripozante,
kaj nin laciĝos nenio;
ni ĝin traportos, sankte ĵurante,
tra l' tuta mondo de Dio!

11. Malfacileco, malrapideco
al ni la vojon ne baros.

Sen malhonora malkuraĝeco
ni kion povos, ni faros.

12. Staras ankoraŭ en la komenco
la celo en malproksimo, –
ni ĝin atingos per la potenco
de nia forta animo!

13. Ni ĝin atingos per la potenco
de nia sankta fervoro,
ni ĝin atingos per pacienco
kaj per sentima laboro.

14. Glora la celo, sankta l' afero,
la venko – baldaŭ ĝi venos;
levos la kapon ni kun fiero,
la mondo ĝoje nin benos.

15. Tiam atendas nin rekompenco
la plej majesta kaj riĉa:
Nia laboro kaj pacienco
la mondon faros feliĉa!

Anoncoj pri morto en Göteborgs-Posten, la 31an de januaro

La gazeto Göteborgs-Posten kolektas la mortanoncojn al la sabataj kaj dimanĉaj numeroj. Hodiaŭ, dimanĉe, mi trovis 54 anoncojn. Antaŭe oni ĉefe dekoris la anoncojn per krucoj, sed hodiaŭ estis nur kvin. Krome mi trovis anĝelon... do, sume estis nur ses religiaj simboloj.

Laŭ mi la plej kuriozaj estas: unu abelujo, 1 lokomotivo, 1 violono, 1 martelo kaj segilo, 1 koncertpiano, 1 fotilo, 1 golfludanto, 1 lumturo, 1 malnova komputilo, 1 fiŝista boato, 1 tri fungoj, 3 simboloj por fotbalaj teamoj. Certe ili spegulas la interesojn de la mortintoj. Kiom ofte vi trovis esperantan simbolon en mortanonco? Tre malofte estas portreto de la mortinto.

En la antikva epoko oni veturis per la remboato de Karono al la lando de mortintoj. Hodiaŭ la veturiloj aspektas alie: 1 rapidaŭto, 1 motorciklo, 4 boatoj aŭ ŝipoj.

Koroj ankaŭ estas popularaj, solaj aŭ en kombino, ekz. kun birdoj, floroj (aŭ kun la antaŭe menciita golfludanto).

Floroj ĉiam estas popularaj objektoj, solaj aŭ kune kun aliaj objektoj. Mi trovis sep kun nur floroj.

Mi trovis kelkajn bestojn. Estis 4 katoj, 1 hundo, 4 birdoj kaj pliaj birdoj en kombino kun sunsubiro, maro, rokoj k.t.p.

Suno kaj maro oftas. Mi imagas ke estas sunsubiro – de la vidpunkto de la vivantoj, sed povus ankaŭ esti sunleviĝo de la alia flanko. Ofte kune kun la suno estas flugantaj birdoj aŭ velŝipo sur maro.

Svedoj estas individualistoj. Laŭ mi ni kreas novajn tradiciojn. Bone aŭ malbone? Vi juĝu!



Tio ne estas bildo pri turistgvidantoj. Estas bildo de la teamo de gotenburga enteriga entrepreno.

Do enterigo ne nur estas morna afero. Ankaŭ devas esti iu pozitiva – por la animo, alveninta al pli bonaj vivkondiĉoj.

Ĉu vi preferas ĉi tiun bildon aŭ bildon pri enteriga teamo en nigraj kompletoj kun blankaj ĉemizoj? /Siv

La Dinastio Broström en Gotenburgo

Parolturno diras: "En dinastio ofte estas ke la unua generacio akiras, la dua administras kaj la tria pereigas"

Parto 1.



Axel kiu akiris ...

Sur "Skeppsbron" en Gotenburgo situas la granda, impona domo kiun la filo de la fama ŝipposedanto Axel Broström, Dan, konstruis en la jaro 1907. "Packhusplatsen 6" estas la adreso, tie "Hovrätten" (la Apelacia Tribunalo) de Okcidenta Svedio juĝadas en la sama loko hodiaŭ.

La dinastio komenciĝis kiam Axel Broström naskiĝis en Kristinehamn en Vermlando en 1838. Estis li kiu fondis la dinastion Broström.

Axel trabatis sin antaŭen kun du malplenaj manoj. Li komencis labori kiel "veturknabo" kaj veturigis per ĉevalveturilo ferojn kaj ŝtalojn de ŝarĝejo norde de Kristinehamn al la haveno, reen li portis ŝarĝojn kiel grenon kaj haringojn.

Tiam Kristinehamn estis tre grava eksportejo por la uzinoj de la mineja distrikto.

Kiam fervojo startis en tiu distanco Axel avancis al kondukisto kaj haltigisto. Poste li estis dungita de pogradisto* en la urbo kiu donis al li laboron pri ŝarĝado kaj malŝarĝado de ŝipoj kiuj veturis sur la lago Vänern tra la kanalo al la urbo Trollhättan kaj poste al Gotenburgo.

Axel havis nur 27 jarojn kiam la pogradisto mortis. Axel frue montris tian grandan taŭgecon ke li povis prunti 2000 kronojn. Li aĉetis sian unuan ŝipon.

Je tiu tempo li neniam vojaĝis ekster sia hejma regiono. Pri Göteborg li nur aŭdis.

Spite al komencaj malfacilecoj la agadoj estis brilaj. Ĉar Axel estis malalta, neŭroza kaj koloreme energia li rapide plenumis multajn taskojn.

Post du jaroj Axel aĉetis du pliajn ŝipojn kaj tiam li mem veturis al Gotenburgo.

Ĉio ĉirkaŭ Axel estis stampita per laboremo kaj ŝparemo. En la apartamento abundis agadraportoj de Axel. Tie ankaŭ loĝis sia edzino kaj tri infanoj.

Kiam la tuta branĉo 1890 estis trafita de krizo, Axel kapablis aĉeti malmultekostajn ŝipojn de Anglujo. Axel ne parolis aliajn lingvojn ol la sveda, sed li povis taksi ŝipojn.

Je tiu tempo Axel dungis helpanton al la oficejo. Krome, lia filo Dan kaj lia filino Karin komencis labori en la firmao. La malnova "Ångbåts AB Ferm" (Vaporŝipa AK Ferm) disvolviĝis en novaj firmaoj, antaŭ ĉio "Ångfartygs AB Tirfing" (Vapora marveturilo AK Tirfing).

Post la longa malalta konjunkturo la eksporto de fer-minaĵo komencis kreski. "AB Tirfing" rapide rajtis havi la transportojn inter la urboj Narvik (en Norvegio) kaj Oxelösund. La kunkurego de "Klondyke" dum la 19a jarcento kaj la buermilito estis faktoroj kiuj estis favoraj al ŝipposedantoj.

Estis multo kiu maltrankviligis Axel Broström, kiu jam estis laborema viro. Li timis ke la familio ne havos la kapablon prizorgi la firmaon estontece kaj tio mordetis lin.

La maltrankvilo pri la ŝipoj, la granda zorgo ankaŭ pezis liajn ŝultrojn. Sed pliaj generacioj Broström surŝultrigis la respondecon de la familio. La filo Dan prenis sur sin la respondecon de la firmao en la jaro 1905 kaj la edzoj de la filinoj Elin kaj Karin ligis sin al la firmao. Ili estis kaj kompetentaj kaj lojalaj. /Ingegerd

* pogradisto = grossist/grosshandlare

La stilo de la renesanco



Komence de la 1400-aj jaroj restis ankoraŭ de la mezepoko baladoj kaj heroaj fabeloj. Neniu povis suspekta ke nova tempo frapis sur la

pordo. Eŭropo ŝrumpiĝis de esti la mondo ĝis esti nur parto de mondo. En tiu atmosfero

finiĝis la mezepoka tempo kaj la kulturo de antikvo revekigis.

Se vi volos vidi la renesancon de la sesdeka jarcento, do, vizitu la palacon "Gripsholm".

La ĉambro de duko Karlo IX situas en la mallibereja turo en la dua etaĝo. Ĝi estas vere bone konservata dum centoj da jaroj. Tie troviĝas tipa renesanca meblaro.

La granda lito estas enmetita en granda fenestroniĉo. Valboj koloritaj kun freŝaj

murdekoracioj montrante kreskaĵojn. Ankaŭ altaj murlignaĵoj kun fiksitaj benkoj.

Famaj personoj estis forprenitaj de libereco en Gripsholm, ekz. reĝo Erik XIV, Johan III kaj Katarina Jagellonica pro diktatorecaj agoj inter la fratoj Wasa.

La renesanco cetere estas plej bone montrita en artaĵoj de tiu tempo. Pensu pri Boticelli, Rafael, Michelangelo, da Vinci ktp ...

Galerio



"La Kreo" de Michelangelo

Super la mondo, en la ĉielo la Dio blovis la spiron en Adamon kaj donis Eva al la mondo. La vivo de homoj sur la mondo komenciĝis.

Efektive fresko alte en plafono de la "Sikstina Kapelo", Vatikano.



Sidu sur la bela sofo, Adam kaj Eva, pensu pri amo kaj plezurdonata ĝardeno. Ne parolu kun la dika serpento en la verda fotelo pri pomoj aŭ la fonto de scio.



"La nasko de Venuso"

Primeditu la belan renesancan belecon de Simonetta Vespuchi, kiun Sandro Boticelli pentris kiel honoron kaj memoron. Parenco de ŝi nomiĝis Amerigo Vespucci, de kiu Ameriko ricevis sian nomon.



Florenco, granda urbo ĉe la Apeninaj montoj, kie pensantaj homoj post la jaro 1500 vizitis la "Galerio degli Uffizio", kie pentraĵoj de la renesanca periodo pendas, ekz. La nasko de Venuso. Kaptu ankaŭ la okazon iri sur la ora ponto "Ponte Vecchio". La rivero Arno fluas sube kaj forgargaras malbonajn memorojn post la jaro 996.

Laste, preĝu vian vesperan preĝon en la "Catedrale di Santa Maria del Fiore" pri la mondo kaj la homoj, pri paco kaj libereco. Amen!





Vintra mateno

el la poemaro: "Poemoj" de Lenke Szász, Rumanio. Foto farita de Lenke.

Mola silento de la vintra nokto –
Nenia movo sur strato, en bloko.
Ĉu vivas mi? Ĉu vivas la vilaĝo?
Disigita mi estas de l' homaro.

Frapado de hakilo min vekigas
Por ekhejti, iu lignon pretigas.
Unua signo ĝi estas de l' vivo.
Inter mi kaj la homoj estas ligo.

Mallumo regas ankoraŭ ekstere,
Sed baldaŭ jam heliĝas surĉiele.
Angor' de la soleco malaperas.
Kaj sentas mi, ke mi denove – vivas

Ne Rapidigu!

el "Poemoj" de Lenke Szász

Leterportiston
atendas vi ĉiutage.
Pasis ok tagoj
kaj vi atendis vane.

En semajnfino
la poŝto funkcii ĉesas,
Malpacience
do, vi la lundon atendas.

Stultulino, vi,
ne rapidigu la tempon!
Tagoj pasintaj
ja mallongigas la vivon.



Malnova Parfumujo

el "Poemoj" de Lenke Szász. Lenke fotis.

Malnovan parfumujon mi heredis
de la patrino, kaj ĝin konservis.
Kiam ĝi estis plena, bonodora,
tiam mia patrino estis juna,

Milito, poste malriĉeco sekvis,
parfumon ŝi neniam plu aĉetis.
Delikata ujo el verda vitro,
sur breto nun ĝi staras, apud libro.



Kiel tiu malnova parfumujo,
malplenas la vivo de maljunulo.
Restas nur io apenaŭ sentebla:
memoro de l' junec' nerevokebla.

Praid



De Rumanio

Ne abundas esperantistoj en Praid, sed Lenke Szász trovas inspirojn de la bela naturo. Jam ŝi eldonis kelkajn libretojn, la plej lastan ŝi nomas "Poemoj". /Siv



"Anekdotoj pri Gabrovanoj"

redaktis Georgi Dolapĉlev, tradukis Neno Janev.

En la esperantobiblioteko en Stannum oni povas trovi multon, ekz. ĉi tiun libron pri la loĝantoj de Gabrov en Bulgario.

La urbo **Gabrovo** – estas inter la plej malgrandaj el la 28 provincaj ĉefurboj de la ŝtato kaj situas en la centro de Bulgario. Ĝi estas la administra centro kaj havas loĝantaron de ĉirkaŭ 67 000 homoj. La urbo

estas enlande konata kiel sidejo de humuro kaj anekdotoj.

Maje okazas humora festivalo, aranĝita de **Muzeo de Humoro kaj Satiro**, kies simbolo estas nigra kato kaj ĉe kies pordo staras skulptaĵoj de Don Kiĥoto kaj lia ŝildisto Sanĉo. Estas ankaŭ Nacia Muzeo pri Edukado.

En Esperanto aperis en 1982 *Anekdotoj pri gabrovanoj* kaj en 1990 *Anekdotoj el Gabrovo*.

Pri la gabrovanoj oni rakontas ke:

- nokte ili haltigas la horloĝojn, por ke ili ne eluziĝu vane.
- ili tranĉas la vostojn de la katoj, por ke tiuj pli rapide pasu tra la malfermitaj pordoj vintre kaj la varmo ne eliru rapide el la ĉambroj.
- ili surmetas verdajn okulvitrojn al la ĉevaloj, por ke tiuj pensu, ke la rabotaĵo, * metita en la trogo, estas fojno kaj manĝu ĝin.
- luante ĉambron, ili ĉiam atentigas, ke apud ĝi estu fosto kun lampo por stratlumigo.

Gabrovo iom post iom estis rekonita kiel monda ĉefurbo de la rido. /Siv

*) svede *hyvelspån*



IT-veroj

El la libro "Komputiloj kaj datenprilaborado" de 1967 de Olle Dopping.



Mi probable forĝesis multon de tio, kio estas en la libro post ĉiuj ĉi tiuj jaroj, sed mi certe memoros la jenajn ŝercojn. Ili estis inkluzivitaj kiel komentoj pri komputilaj teknologiaj fenomenoj.

Sur ŝipo, la ŝipsubestro iam estis ebria.

Tiam la ŝipestro skribis en la loglibro: "La ŝipsubestro estis ebria hodiaŭ".


La sekvan tagon la ŝipsubestro skribis en la loglibro: "La ŝipestro estis sobra hodiaŭ".

Difino estas io, kion ĉiuj scias, esprimita en maniero, kiun neniu komprenas.

Komputilo montras eksteren dekuman nombron kiel kvanton kaj eble minussignon, sed profunde (kiam neniu vidas ĝin) ĝi uzas la tiel nomatan "komplementan metodon".

Sen psikanalizo, ni neniam ekscius, ke kiam ni pensas aferon, la afero, kiun ni pensas, ne estas la afero kiun ni pensas, sed nur afero, kiu igas nin pensi, ke ni pensas la aferon, kiun ni pensas ke ni pensas.

Unu bildo diras pli ol mil ĉinajn proverbojn.
(Rusa proverbo)



(Ĉina proverbo)

La arto de legado rilatas al la arto de preterlaso.

Se eraro povas okazi, ĝi okazos.

Optimisto: programisto kun inkplumo. (Ĉi tiu libro estis skribita **1967**. Mia rimarkigo :-)

Estas neeble fari ion idiotsekan, ĉar idiotoj estas tiel spritaj.

La komputilo estas maldiligentulo, kiu bezonas diligentan mastron.

Kopii de unu aŭtoro nomiĝas plagiato, skribado de du nomiĝas kompilo, kaj skribado de tri aŭ pli nomiĝas esplorado.

/Lasse Granat

Epizodo el eta ĉina urbo

(el la retpaĝo de Robert Poort, Facebook)



Neniam antaŭe estis tiel facile spekti la vivon en aliaj mondpartoj.

Jen epizodo de Wenchang, Ĉinio. Shanshan maldekstre sur la bildo.

<https://www.facebook.com/criesperanto/videos/2762006967396368>

Temas pri la jena

Juna virino, Shanshan, havis revon fariĝi servistino. Ŝi translokiĝis de Pekino al Wenchang, en suda Ĉinio. Nun ŝi estas servistino en la trinkejo Laobacha, kiu signifas "teo de patro". Tamen ŝi pensas ke estas trinkejo por "onkloj", ĉar en la dialekto de

Hainan oni kutime nomas la pliaĝulojn Laoba = patro – tamen simile al onklo.

Fakte temas ne nur pri teo, sed pri loka kulturo. Shanshan amas babilu kun la lokanoj. Ŝi sentas sin malstreĉa, for de la rapida ritmo de Pekino.

Do, spektu la videon kaj ĝuu la entuziasman voĉon de Shanshan! /Siv

Bonvesperon jen invit'



Bonvenkanto el la provinco Dalekarlio laŭ Gyris Anders. Tradukis "Kukuleto" en 1993. Ĝi troviĝas en Norda Kantaro de Martin Strid.

<https://www.youtube.com/watch?v=seU3VjMxB6o>

1. Si godafton och godkväll;
min utvaldaste vän;
huru lever nu världen med dig?
Har du/nöjen och mår bra;
som jag tror väl att du har;
har du hälsan, visst roar det mig?

2. Har du silver, har du gull;
har du kistorna full;
har du penningar,
visst roar det mig?;
Men jag har ett nöjsamt sinn;
det är rikedom min;
det är bättre än penningar och gull.

3. När jag tänker uppå dig;
röres blodet uti mig;
lilla vännen, förglöm aldrig mig;
Sir du stjärnorna de små;
uppå himmelen den blå;
falla neder till jorden som strå.

4. Förr skall sjöar och strand;
varda torra som sand;
förrän jag tager mig nån ann;
Förr skall måne och sol;
falla neder till jord;
förrän jag ändrar om i dessa ord.

1. Bonvesperon, jen invit';
elektita bonamik';
kiel vivas la mondo kun vi?
Ĉu amuzo kaj bonfart';
kion mi kredas via part';
ĉu vi sanas, ja interesas min?

2. Ĉu je oro kaj arĝent';
plenas kestoj af moment'
ĉu en kestoj je kontent';
ĉu da mono – min interesas kon'?;
Kontentemas mia mens';
jen la taŭga rekompenc';
ja pli bonas ol mono kaj arĝent'.

3. Kiam pensas mi pri vi;
iĝas mova sang' en mi;
amiketo, forgesu negi min!
Vidu stelojn, nokta hajl';
sur ĉiela nigremajl';
fali teren, malsupren kiel pajl'.

4. Pree lagoj kaj strand';
estos sekaj kiel rokrand'
ol mi amos alian en la land';
Pree falos la lun';
jen sur teron, kaj la sun';
ol mi ŝanĝos tion kion mi parolas nun.



Ole Therkelsen, Esperanto kaj la Kosmologio de Martinus




Mi plukis kelkajn florojn... ne mi plukis kelkajn diraĵojn el 47-minuta longa intervjuo kun Ole Therkelsen, Danio.

https://www.youtube.com/watch?v=j7J_G7_WnwY

Ole Therkelsen lernis esperanton por havi la eblecon prelegi pri la Kosmologio de Martinus en esperanto.

Li lernis esperanton pasive kiam li permane kopiis esperantajn tekstojn. Kun tiu bazo li venis al la popolaltlernejo en Karlskoga kaj rapidege lernis paroli Esperanton sub la gvidado de Lars Forsman. En 2000, kiam mi studis tie, li dum unu semajno anstataŭis Lars. Mi memoras lin kiel entuziasman instruiston.



Li tiam ne prelegis pri la Kosmologio, sed tri el miaj klasanaj faris tion private, kaj mi trovis ke la mondo vastiĝis.

Ole Therkelsen vojaĝis al multaj landoj. En Francio li prelegis pri Martinus france kaj por esperantistoj esperante. Same in Aŭstralio, kaj en Usono, angle kaj esperante, en Germanio germane kaj esperante. Li do parolis multajn lingvojn. En Japanio, Ĉinio, Ĉeĥio, Pollando kaj Litovio li tamen bezonis esperantistajn interpretistojn. En Rusio li

kvinfoje esperante prelegis pri Martinus kaj en Ĉinio li sukcesis trovi tradukistojn por kvar el la "simbolaj libroj" de Martinus.

En Klint, Jutlando, li dum multaj jaroj gvidis somerajn kursojn kaj pri la esperanta lingvo kaj pri la Kosmologio en esperanto. Li diras ke la homaro pli kaj pli – post la travivaĵo de multaj krizoj, malfacilaĵoj kaj militoj – estos pli perfekta kaj perfektaj homoj volas nur perfektan lingvon – unue kiel la duan lingvon sed poste kiel la komunan mondan lingvon.

Post la franca revolucio 1789 oni en Francio akceptis unuecajn mezurilojn: Temas pri la kilograma kaj la metra sistemoj. Sed daŭris pli ol 100 jaroj antaŭ ol Danio akceptis tiun sistemon. Por lingvo devas daŭri pli longe – almenaŭ 300–500 jarojn antaŭ ol oni kunsentos pri unueca lingvosistemo.

La nombrosistemo kun 0 (nulo) estas perfekta. Kio estas en Esperanto la paralelo al nul? Estas -o, -a kaj -e en la fino de substantivo, adjektivo kaj adverbo. Krome la sistemo krei vortojn estas elstara.

Multaj esperantistoj reagas kiam Martinus/Therkelsen diras ke en estonteco estos unu mondo kun unu lingvo. Oni volas protekti siajn naciajn lingvojn. Sed egoisma nacieco devas foriĝi. Pripensu la ideon ke ĉiuj povos kompreni unu la alian lasante la nunajn eternan tradukadon, kiu baras al

homoj libere interparoli. Ĉar esperanto estas la plej longe uzata el la planitaj lingvoj kun perfekta konstruado, Martinus proponas Esperanton kiel mondlingvon, unue kiel ĉies duan lingvon poste kiel la unuan.

Martinus antaŭdiris la nunan virusan mondmiliton, dirante ke devas veni

”mondmilito, tute alia ol la aliaj mondmilitoj”. ”Ĝi aperus en la komenco de la nuna jarcento. Necesas ke homoj havu tiun sperton por evoluiĝi al plej altstaraj homoj”.

Kune kun la esperanta flago estas la Martinusflago. Interrete vi povas trovi pli pri Martinus kaj la Kosmologio. /Siv



Pri revo, realo kaj etoso en Svedio

Dum la 19a jarcento Svedio estis malriĉa lando. Por trovi prosperon, multaj enmigris en Amerikon.

Post du mondmilitoj, en kiuj Svedio ne tro estis envolvita, la industrio kreskis, kaj homoj grandskale translokiĝis de la kamparo en la urbojn. Nova urba kulturo evoluis, sed la ligiloj al la kamparo kaj arbaroj estas fortaj. Naturromantiko ”invadis” literaturon, arton kaj kantojn kaj oni komencis opinii ke la dolĉa melankolio estas tipa trajto de la sveda karaktero.

Eĉ nun kiam usona kulturo kaj angla lingvo regas la junulojn, ni ĉiuj iel pro la covid-pandemio – revenas al la naturo. La arbaroj donas trankvilon kaj sperton pri sana vivo. Anstataŭ iri al atletaj haloj, oni reesploras la arbarojn.

Arbaroj ludis grandan rolon en la vivo de John Bauer, kiu pentris la etoson de la magiaj arbaroj ĉirkaŭ Jönköping (en la novembro numero de Ora Ĵurnalo). Laŭ mi la sama dolĉa melankolio troviĝas en la poemoj de Dan Andersson. Sed unue ĝoja mara kanto, eble iomete moketa. Maljunaj esperantistoj en Svedio kiuj iam partoprenis esperantokurson

diras ke eĉ se ili forgesis ĉion, ili klare memoras la kanton ”Maristo Jansson”.



La sveda poeto Dan Andersson (1888–1920) verkis la poemon Maristo Jansson kaj ankaŭ faris la melodion.

Li elkreskis en malriĉa hejmo, sed riĉa je libroj. La sovaĝa naturo de Grangärde – ”finna

kolonio” en Dalekarlio kaj spertoj kiel karbigisto igis lin fariĝi verkisto.

Dum sia juneco li estis sendita al Usono por fariĝi farmisto, sed la promesita parcelo ”malaperis” kaj la patro de Dan igis lin hejmeniri. Bonege por la sveda literaturo!

En 1917 Dan Andersson financiĝis kun la instruistino Olga Turesson. La saman jaron Jungman Jansson aperis en la humura semajna gazeto Strix. La kanto estas pastiĉo de la multaj kantoj pri la maristo kiu velas foren kiam la fiancino staras atendente kaj plorante sur la strando.



Maristo Jansson (Jungman Jansson)

Hej o ho, maristo Jansson, blovas nun matena
vento;
tuj Konstancia foriros, pasis lasta nokto do;

Ĉu vi kisis la patrinon, Stina'n eĉ kun plora sento;
ĉu eltrinkis vi la brandon? – jen kant': Hej o ho!

Hej o ho, maristo Jansson, ĉu vi timas ke fidelo;
de l' knabino translokiĝos al alia korhero'?

Via koro nun martelas kiel tremas matenstelo;
Turnu nazon al la vento – jen kant': Hej o ho!

Hej o ho, maristo Jansson, eble venos via sorto;
ĉe virinoj ne sed ŝarkoj en la sudaj maroj, ho!;

Post koraloj ventŝiritaj embuskadas eble Morto;
senindulga sed sincera li estas – Hej o ho!

Eble sidos vi maljuna sur farmej' en Alabama;
dum forpasos viaj jaroj malrapide, certe tro;

Eble Stina'n vi forgesos je brandglut' en Jokohama;
malzorgege, sed homece – jen kant': Hej o ho!

**El la poemaro "Svarta ballader" (Nigraj baladoj) mi elektis Ĉirkaŭ ulo de Luossa.
Ĝi estas nomita "La plej religia poemo, kiun posedas la sveda lingvo".**

Ĉirkaŭ ulo de Luossa (*"Omkring tiggarn från Luossa"*). Sveda

teksto: Dan Andersson (1888–1920) Esperantigis: Gustav Stenholm.

Ĉirkaŭ ulo de Luossa sidis ja kampara rond',
Ĉe tendara fajro sonis lia kant'.
Kaj pri almozuloj, kaj vagistoj kaj mirinda mond'.
Kaj pri sopiroj liaj estis nokta ĉant'.

Estas io trans la montoj, trans la floroj kaj la kantoj,
Estas io trans la steloj, trans la arda kor' de mi,
Aŭdu! Io iras, flustras, vagas, logas min kaj petas:
Ek al ni, ĉar tiu tero ne la regno ja por vi!

Mi aŭskultis je la kvietaj ondobato al la strand',
Pri ripoz' de l' mara muĝo revis mi.
kaj en pensoj mi ja kuris al la sen-forma land',
Kie la plej karuloj pasos for de ni.

Sekvu, frato, min trans montoj kun riveroj la kvietaj,
Ja, la maro pace dormas inter montoj kaj kampar'.
luloke trans-ĉiele, mia hejm', patrinaj etaj,
Mez' en or-ŝprucintaj nuboj en mantel' el roza ar'.

Estas io trans la montoj.....

Bildo de Pixabay



Estas naŭ versoj, sed mi trovis esperantan tradukon nur de kvar.

Dan Andersson ne estis nur revemulo sed ankaŭ realisto kun humuro. Dum la tempo kiam li estis dungita ĉe la gazeto "Ny Tid" (Nova tempo) en Gotenburgo (1917–1918) li skribis moke – kaj sprite – pri ĉiutagaj aferoj. Li skribis pri la noktaj tramoj en Gotenburgo. Paralele al noktaj trajnoj li ja devas kunporti noktajn ĉemizon, kulvualon, songointerpretan libron kaj – kraĉskatolon (malgraŭ ke la

snuftabakon li ne kunportis). Kompreneble li estis ĵetita el la tramo kaj post li venis la noktoĉemizo kaj liaj aliaj aĵoj, laste la kraĉskatolo.

Kontraste al la longaj mallumaj vintraj horoj, kiuj ankaŭ havas siajn poetojn, estas la dolĉe melankoliaj poemoj, kiuj donas mistikan etoson al la arbaroj kaj la longaj helaj somernoktoj.

/Siv

INK-konkurso

Kun peto informi viajn membrojn kaj publikigi en via bulteno kaj retejo.

Interkultura Novelo-Konkurso (INK) estas konkurso organizata de Akademio Literatura de Esperanto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio, celanta instigi aktualan novelan kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj. Sama temo, malsamaj vidpunktoj, malsamaj historioj...



La temo de la konkurso estis voĉdonita rete: **"KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin"**. Aŭtoroj estas nun invitataj verki novelojn pri ĉi tiu temo kaj sendi ilin per reta formularo **antaŭ la 20-a de junio 2021**:

<https://www.akademio-literatura.org/ink>

Pensu: la nova koronaviruso, kiel ĝi ŝanĝis vian vivon aŭ la mondon? Per ĉi tiu temo, vi povas trovi inspiron por skribi fikcian rakonton okazantan en la pasinto (dum la unuaj – kelkfoje frenezaj – monatoj de la pandemio), nuntempe (kiam pandemio iĝis preskaŭ

kutima afero de la vivo) aŭ en la estonto (post jaroj, jardekoj aŭ eĉ pli... kia estos nia mondo?)

La tekstoj havu maksimume 12 000 karaktrojn (proksimume 6 paĝoj). Ne estas minimuma longeco. Poste, interkultura ĵurio taksos la novelojn kaj anoncos gajnintojn dum la 107a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio en Montrealo, somere 2022. La aŭtoroj de la tri gajnintaj noveloj ricevos premion de 500, 300 kaj 200 eŭroj, respektive.

Finalistajn novelojn oni povos legi en rete publikigota novelaro.

Ĉu vi ŝatas literaturon, novelojn, novelkonkursojn, INK-on? Ni volas aŭdi pri vi!

Akademio Literatura de Esperanto
www.akademio-literatura.org
info@akademio-literatura.org

Greziljono, la palaco kie kvarfoje/jare estas kursoj/kunvenoj – almenaŭ se ne estas pandemio. Eble dormas Dornrozeto en la palaco, atendante la finon de la virusatakoj. Espereble la kastelo baldaŭ vekiĝos el sia Dornrozeta dormo! /Siv

Kulturdomo de Esperanto – Kastelo Greziljono
St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU, France
<https://gresillon.org>



La dua parto de alfabeto ludilo de Inga



La **g**-litero en la sveda lingvo havas du sonojn. En esperanto vi vidas ĉu la **g**-litero estas malmola, kaj do mola sono havas la literon **ĝ**.

Bona ekzemplo estas la vorto **ansero** – svedlingve **gås**.

Anseroj kaj **anserido** estas svedlingve **gäss** kaj **gässling**. Se oni skribus tiujn du vortojn en esperanto fariĝus **ĝes** kaj **ĝesling**. La grava ĉapelo super **g** montras kiel mola la litero estas.

Malmolaj **g**-vortoj en esperanto
gaja gajni gapi gaso geto giri

Molaj vortoj
ĝoja ĝemi ĝeni ĝibo ĝui ĝiri
Notu – **germana persono / ĝermana lingvo**

Gravaj estas **igi iĝi**

Aliaj vortoj **ĝi ĝis**

H *kun* aŭ *sen* ĉapelo

horo hoko homo
aĥ
ĥoro ĥano ĥaoso

-**i** baza formo de verbo en vortaroj, ne montras tempon dependas de alia verbo ekz **povas vidi, volas diri, devas fari**

-**is** verbo antaŭ la momento de parolado, pasinta tempo ekz **laboris, estis, sidis**

aliaj vortoj **iu, io, ia, ie, iam, ien** k.s.
ili, ilo, ino, iri k.s.

i kaj **j** estas literoj anstataŭ la litero **y**, kiu ne estas en esperanto ekz **ciklo ciklono cilindro cinika jes jakto jardo jogurto**

-**j** montras pluralon

ekz inoj iloj jaroj junaj ĵakoj

aliaj vortoj **ja jam je jen ju**
jako jaro juĝi juki juna

ĵ **ĵako ĵazo ĵeti ĵigo ĵipo ĵuro ĵus**

Literoj

Jen la alfabeto de Esperanto:

a a, **b** bo, **c** co, **ĉ** ĉo, **d** do, **e** e, **f** fo, **g** go, **ĝ** go, **h** ho, **ĥ** ĥo, **i** i, **j** jo, **ĵ** ĵo, **k** ko, **l** lo, **m** mo, **n** no, **o** o, **p** po, **r** ro, **s** so, **ŝ** ŝo, **t** to, **u** u, **ŭ** ŭo, **v** vo, **z** zo

^: sur la literoj **c, g, h, j, s** povas aperi *ĉirkumflekso, ĉapelo*

ŭ estas u kun hoketo

5 (kvin) vokaloj: a e i o u

23 (dudek tri) konsonantoj: b c ĉ d f g ĝ h ĥ j ĵ k l m n p r s ŝ t ŭ v z

Ekzerco prononci:*

A kiel afabla avo en Armenio
B kiel blua botelo en Bulgario
C kiel cigareda cindro en Centra Afriko
Ĉ kiel ĉefa ĉambro en Ĉeĥio
D kiel dolora dento en Danlando
E kiel erara edzo en Ekvadoro
F kiel flava fromaĝo en Finnlando
G kiel gaja gasto en Grekio
Ĝ kiel ĝentila ĝemelo en Ĝibutio
H kiel helpema homo en Hungario
Ĥ kiel ĥaosa ĥoro en Ĥarkovo
I kiel interesa insulo en Indonezio
J kiel juna jaguaro en Jamajko
Ĵ kiel ĵaluza ĵurnalisto en Ĵuraso
K kiel kuranta kato en Kanado
L kiel longa lito en Luksemburgo
M kiel memorinda monato en Maroko
N kiel neĝa naturo en Norvegio
O kiel ordinara orangĝo en Oceanio

P kiel ploranta policisto en Portugalio
R kiel ruĝa robo en Rumanio
S kiel sola sinjoro en Svedio
Ŝ kiel ŝika ŝakalo en Ŝanhajo
T kiel trankvila trajno en Tanzanio
U kiel unua urso en Usono
Ŭ kiel aŭdebla aŭto en Eŭropo**
V kiel verda vilaĝo en Vjetnamio
Z kiel zigzaga zebro en Zimbabvo

Jen kelkaj matematikaj literoj:

x: ikso y: ipsilono q: kuo w: duobla vo
α: alfa μ: mu φ: fi

* aŭtoro: *Inga Johanson, el Svedio*

** nur kelkaj vortoj komencas per ŭ:
ŭo, ŭa! (krio de bebo aŭ bojo de hundo), ŭaŭ!
Ŭato (James Watt), ŭato (1 ŭato = 1W)
En la aliaj vortoj, la litero ŭ aperas nur post a
(aŭ) kaj e (eŭ).

Ne krokodilu!



Se vi parolas vian gepatran lingvon dum esperantokunveno, kiam ĉeestas persono, kiu ne regas vian lingvon, vi krokodilas.



Jen infankanto pri krokodilo:

La krokodilo

E-teksto Lydia ZAMENHOF

La krokodil' irante al milito
Al la idar' adiaŭ diris ĵus.
Foriris ĝi muĝante kun ekscito,
Pri elefanto pensis ĝi kun ruz'.

Rekantaĵo:

**Se la kro-kro, kro-la-kro-kro,
Kro-la-krokodilo
Malaperis for en Nil' –
Ni ne parolu plu.
O-e-o o-e-o-e-o o o o**

Murmuris ĝi militan marŝon glute,
Inter la dentoj vortoj restis for.
Kiam la faŭkon ĝi malfermis tute
La malamikoj tremis en la kor'.

Rekantaĵo: Se la kro-kro....

Ĉe Nilo-bordo zumas ĝia kanto
Kaj ĉio tremas ĉe la bord de Nil'.
Kaj jen – subite venis elefanto
Kaj malaperis brava krokodil'!

La krokodilo

trad. Lydia Zamenhof

franca popolkanto

The musical score is written in 2/4 time and consists of ten staves. The lyrics are written below the notes. The first staff begins with the lyrics 'La kro - ko - dil' i - ran - te al mi -'. The second staff continues with 'Mur - mu - ris ĝi mi - li - tan mar - ŝon'. The third staff has 'Ĉe Ni - lo - bor - do zu - mis ĝi - a'. The fourth staff contains '- li - to al la i - dar' a - di - aŭ di - ras'. The fifth staff has 'glu - te in - ter la den - toj vor - toj res - tis'. The sixth staff contains 'kan - to kaj ĉi - o tre - mis ĉe la bord' de'. The seventh staff has 'jus. for - i - ris ĝi mu - ĝan - te kun eks'. The eighth staff continues with 'for, ki - am la faŭ - kon ĝi mal - fer - mis'. The ninth staff has 'Nil'. Sed su - bi - te ve - nis e - le -'. The tenth staff contains '- ci - to pri e - le - fan - toj pen - sis ĝi kun ruz''. The eleventh staff has 'tu - te, la mala - mi - koj tre - mis en la kor''. The twelfth staff contains '- fan - to kaj mala - pe - ris bra - va kro - ko - dil''. The thirteenth staff has 'Se la kro, kro, kro, la kro, kro,'. The fourteenth staff contains 'kro, la kro - ko - di - loj mala - pe - ris for en Nil', ni'. The fifteenth staff has 'ne pa - ro - lu plu. plu. o - e - e'. The sixteenth staff contains 'o - e - o - e - o - o - o - o - e - o'. The seventeenth staff has 'o - e - o - e - o - o - o - o - o'.



Esperanta poetika retejo el Islando



Serĉu poezion en *Esperanta poetika retejo* <https://poetika.esperanto.is>

Grupigitaj laŭ:	Greka (1)	Pola (6)	Esperanto
Ĉina (1 + 2)	Hispana (6)	Rusa (7)	originala (17)
Angla (1)	Islanda (177)	Skota (1)	Latina (4)
Finna (3)	Itala (1)	Ampoemoj (8)	Naturaj poemoj (2)
Franca (11)	Kroata (5)	Edda poemoj (6)	Proza poemoj
Germana (14)	Norvega (5)		

Odiseo

Unua verso: Fine mi aŭdis la Sirenojn kanti

Aŭtoro: Hannes Pétursson

Tradukanto: Baldur Ragnarsson

Fonto: La Tradukisto – 13a numero.

Dato: 2002

Grupo: Islanda

1. Fine mi aŭdis la Sirenojn kanti.

Min kaptis kantoj de diabla povo.

Mortigan belon mi trinkis per propraj oreloj.

2. Fine mi aŭdis la Sirenojn kanti.

Denove maro tumultas. Atendas Itako

mia regno, mia palaco, mia forno krakanta.

3. Kaj scias: Nur tiu garnita per ruzo dieca

sin riski povas en ilian proksimon, povas aŭskulti

sen esti perdita, gastu la kampon florozan.

4. Mi kiu aŭdis la Sirenojn kanti

baldaŭ lasos la maron, ĝuos kvietajn bordojn

kun voĉoj magiaj restantaj en mia sango.

**Grupoj el diversaj landoj partoprenas. Finnlando kaj Norvegio
ĉeestas, sed Danio kaj Svedio ne. Ĉu poezio ne interesas nin?**

Islandaj aforismoj

Unu homo estas nur duono
kune kun aliaj ŝi estas pli ol si mem.

Einar Benediktsson

Distancoj blukolorigas la montojn
kaj grandigas la homojn.

Jóhann Sigurjónsson

Eĉ se vi vojaĝas ĉirkaŭ la mondon
viaj pensoj kaj koro portas
la trajtojn de via hejmlando.

Stephan G. Stephansson

Bela suno estas ĉiam juna
sub arĝentaj haroj.

Steingrímur Thorsteinsson

Eta vizito en Stokholmo

de Kerstin Rohdin



MATENAS. Ankoraŭ malheletas. Sidas ĉe la kuireja tablo kun mia taso da kafo.

Sur la ĉielo strioj da malhelaj nuboj. Sub ili aperas iom post iom la aŭroro. La frosto tremas en la aero, antaŭ ol la malforta varmo de la suno superfortas la froston.

Vestita en longa subpantalono kaj trikita jako sub la vintra mantelo mi enbusiĝis kaj post duona horo mi alvenis en la centron de Stockholm. La mondo ĉirkaŭ la buso estas vestita en maldika tavolo da neĝo. La arboj vestiĝas per prujno. La oblikva sunbrilo origas la froston, kreas brilantojn sur la neĝo.

Lagoj, golfoj videblas, kie glitkuristoj jam frumatene sketas. La urbo estas kaptita en forta teno de la klara vintra tago. "Venezio de la Nordo" estas tenata de la glacio.

Glacirompa ŝipo tranĉis vojon por surakva trafiko. Kiel facile La Naturo superas la civilizacion de la socio!

Malgraŭ la frosto la homoj kuras inter la diversaj butikoj kaj vojaĝoficejoj, kiuj ĉiuj reklamas malmultekostajn varojn kaj vojaĝojn, por ke homoj uzu sian monon ankaŭ dum malaltkonjunkturo.

Mi trovis la varojn, kiujn mi intensis aĉeti en la urbo – paperon por leteroj kaj skribilojn. Mi trovis miajn "goji-berojn" en la Centra Bazaro. Oni diras ke tiu nomo signifas "feliĉoberoj".

Mi aŭskultis koncerton – adiaŭon al Kristnasko en Klara preĝejo, unu el la plej malnovaj de Stockholm. La koncerto komenciĝis per solena ludado de kariljono. Sub malforta sunbrilo mi pasumis "Unter den Linden" en la Reĝa Ĝardeno. Muziko sonis. Infanoj sketis. La ruĝa preĝejo de Jakob dominas la foran parton de la Reĝa Ĝardeno kaj la Placo de Karl XII.

La kafejo Söderberg, kiu estas somera kafejo kaj ne izolita por vintra vetero, tamen estis

malfermita. La glacio okupas la kadrojn de la etaj fenestroj. Mi vidas la mondon kiel etajn



artaĵojn enkadrigitajn per glacio. Kelkaj centimetroj da neĝo surgrunde. Homoj en

dikaj vintraj vestoj vagas tien kaj reen kun pakaĵoj kaj plastaj sakoj.

Mi sentis min parto de klasika rusa romano kiel rigardanto el la kafejo al la enloĝantoj, kiuj rapidis sur la stratoj de Sankt Petersburg. Homoj kurantaj vestitaj en longaj vintraj manteloj dum la frosto premas la urbon.

Malforta lunarko alte surĉiele. Krepusko ĉirkaŭbrakas arbojn kaj domojn. Mi interparolas kun Doktoro Glas, kiu ĵuste tie ĉi, antaŭ cent jaroj ofertis al sia rivalo glason da akvo fortigita per trodozo da medikamento por liberigi lian edzinon – ĉu eble por si mem? Post iom da parolo kun la fama Doktoro Glas en la romano de Hjalmar Söderberg mi eliris, por laŭ la kajo de Strømmen kun la sunsubiro rebrilanta en la akvo trovi la vojon al mia buso hejmen.

7-an de januaro 2009 *Kerstin*



Kiu estas Sankta Luĉio?

Kerstin Rohdin rakontas



Aŭguro: "En frua pratempo nenio ekzistis, ne sablo, ne maro, ne varmeta tero.

Ĉielo ne ekzistis, nesatigeblaj buŝoj ne ekzistis, ne ekzistis herbo.

De sudo la suno metis, kune kun la luno, sian dekstran manon ĉirkaŭ la rando de la ĉielo.

La suno ne sciis kie ĝi loĝis.

La luno ne sciis kiun potencon ĝi posedis.

La steloj ne sciis kie ili staru."

Tiel estis en Skandinavio. En norda Svedio, en Laponio dum la vintro la suno ne trovas sian vojon super la horizonto dum tuta monato.

Tio signifas, ke regas mallumo. La homoj timas ĉu la suno iam revenos por doni manĝon kaj lumon al ni. La homoj faras siajn plej grandajn klopodojn por konvinki la diversajn diojn, ke ili redonu vivon al ni.

Dum la plej mallonga tago de la jaro la homoj kolektiĝis en la malnova templo de Uppsala (apud Stokholmo) kaj provis persvadi la diojn redoni manĝon kaj lumon al ili. Oni donis ĉiun troveblan manĝon al la dioj kaj festis kun ili. Oni fritis novbuĉitan Juloporkon kaj

festmanĝis tion kune kun la dioj. Kune oni gustumis la novfermentintan Julbieron.

La skandinavoĵoj eĉ hodiaŭ manĝas porkviandon dum la Julofesto por certiĝi ke la dioj resendos la sunon kaj lumon. (Julo estas malnova skandinava vorto por Kristnasko, ankaŭ Esperanta). La homoj kaj la dioj manĝis, dancis kaj kantis petante la sunon reveni.

Okazis, ke kelkfoje venis misiistoj por nova religio "kristanismo". Ili abomenis tion kion faris la skandinavoĵoj por rehavi la lumon kaj varmon. La misiistoj kapablis skribi kaj ili rakontis pri siaj abomenaj sentoj. Longe poste, kiam ankaŭ la skandinavoĵoj kapablis skribi ili kolektis la rakontojn en libro nomita Eddan kaj islandano, Snorri Sturlason kvazaŭ "eldonis" ĝin. Dum jarcentoj la skandinavoĵoj provis diversmaniere revoki la lumon al si.

Per lignopeco kun literoj nomitaj "runoj" tranĉitaj en ĝi la homoj kapablis kalkuli la tempon por semado, rikoltado kaj diversaj laboroj en la tero. Ekzistis ankaŭ romiaj

kalendaroj: la juliana kaj la gregoriana. En 1582 oni decidis ŝanĝi al gregoriana kalendaro. La sciencistoj ne kapablis tute ekzakte kalkuli la cirkuladon de la terglobo. Ankoraŭ oni uzas la gregorianan kalendaron kaj la pli longa nokto de la jaro ŝanĝiĝis de la 13-a de decembro ĝis la 23-a de decembro (proksimume). Sed por kontentigi Sankta Luĉio ni en Svedio ankoraŭ diras, ke la plej longa nokto, la nokto de Sankta Luĉio estas la 13-a de decembro.

Malgraŭ misiistoj kaj novaj dioj la homoj estis singardaj kaj ne volis tuj forlasi siajn malnovajn diojn. Oni iris al la templo en malnova Uppsala kaj preĝis al Oden ke li trovu kaj resendu la sunon kaj la lumon, ke Tor sendu la pluvon por ke kresku la semoj. Li rajdis surĉiele kaj kreis la tondran bruon. La gedioj Frej kaj Freja kreskigis la estontan manĝon sur la kampoj.

Ekzistas kvazaŭ tri aŭ kvar "epokoj" pri la lumo kaj Luĉio. La nomo Luĉio devenas de la vorto lux, kiu signifas lumo en latino. Luĉio de Sirakuso estis bela virino, fianĉino al romiano. Ŝi estis riĉa kaj ŝi estis kristanino. La fianĉo ne ŝatis tion. Luĉio donis sian doton al malriĉuloj. Oni volis konduki ŝin al putinejo, sed tio ne sukcesis. Tiam oni provis bruligi ŝin sed la flamoj ne volis bruligi ŝian korpon kaj fine ŝi estis mortigita per glavo. Tiam ŝi eltiris siajn okulojn. Tiel Luĉio fariĝis simbolo por okulmalsanoj kaj okulkuracado.

Dum la 17a kaj 18a jarcentoj fariĝis iu miksaĵo inter tiu Luĉio de Sirakuso kaj nordiaj diversspecaj alivestitaj figuroj. Tiu Luĉio portis longan blankan vestaĵon kun ruĝa rubando ĉirkaŭ la talio. Surkape ŝi portis grandan kronon kun lumantaj kandeloj. La lumo kiu forprenu la malhelon. Tiu tradicio eniris la okcidentan parton de Svedio. Tio komenciĝis en kasteloj kaj bonhavaj familioj.



Antaŭ la Julofestoj kiam oni manĝu multon okazis la fastotempo. Por tion elteni oni devas multon manĝi por prepari sin por la fasto. Do tre frue kiam ankoraŭ regis profunda malhelo evenis bela virino vestita

en longa blanka vesto kvazaŭ ŝi ĵus ekstaris el la lito. Post ŝi sekvis vico de virinoj ankaŭ vestitaj en blankaj vestoj, kun kronoj de vakciniaj (ĉiam verdaj plantoj) tigoj surkape. Ili portas kandelajn enmane. Tiu aro de

blankevestitaj virinoj kun kandeloj lumigis la korton de la farmo, kiun la ombroj kaŝas.

La viroj de la farmo vekigis aŭdante la kanton defore. Ili iom post iom vekigis kaj imagas, ke ili estas en la ĉielo. Eĉ pli ili tion imagas, kiam ili odoras kaj vidas ĉion bongustan kion portas la junulinoj. Ŝinkon, hepaton, multon de la buĉado kion oni provu antaŭ Julo. Ankaŭ estas grave gustumi la novan bieron. Oni ja multon laboris pri la buĉado kaj la

rikoltado. Oni devas multon manĝi antaŭ la fasto, kiu venas antaŭ la Julofesto. Oni ankaŭ gustumis specialan panon kun biermosto. Eble oni povis iom gustumi la specialan lesivan fiŝon. Fiŝon ja oni rajtas manĝi antaŭ kaj eĉ dum la fasto. La virinoj kantas en la malhelo. Poste ĉiuj manĝas malrapide ĝis iom heliĝas ĉe la horizonto. Ĉu la homoj konscias, ke ili ofertas kaj preĝas al la dioj, ke la lumo kaj varmo revenu en la mondon.



Tiel oni festis la vintran solsticon en kasteloj kaj bonhavaj familioj en la okcidenta parto de Svedio. Estas rakontoj, ke se gastoj el orienta Svedio ekzemple de Stokholmo venis kaj estis vekitaj de tiaj "spektakloj" ili krie ektimis. Iom post iom tiu tradicio evoluis malsupren en la socio kaj diversloken en la lando pleje en regionoj kie oni kultivis kaj kie ne kreskis tro da arbaro. Dum pluraj jaroj speciale en okcidenta Svedio venis Sankta Luĉio en frua mateno, sed iom post iom ŝi regalis per kafo kaj spickuketoj kaj luĉifesta kringo, kiu lumas flave de safrano, kiun eblis aĉeti nur por la

kristnaska tempo. Certe ĉiuj sentis, ke venas pli agrabla tempo.

Dum la 19a kaj 20a jarcentoj en multaj hejmoj, speciale en la kamparo oni regalis per Luĉiomatenmanĝo. Aldoniĝas al la aro da knabinoj ankaŭ "stelknaboj". Komence ili ĉirkaŭiris kantante por peti monon aŭ manĝon de la homoj por siaj lernejaj studoj. En tiu tempo oni devis pagi por studoj post la baza lernejo. Kelkaj knaboj studis en katedral-lernejoj en la urboj por fariĝi pastoroj aŭ instruistoj en "altaj lernejoj". Ne multaj atingis tiel altajn studojn. Kelkfoje la pastoro

de la paroĥo helpis al talenta knabo pagi la studojn. La knabinoj en tiu tempo ege malofte atingis "altajn studojn". Nur dum la lastaj jardekoj virinoj rajtis studi por esti pastoro. Dum la lastaj jaroj virino povis esti episkopo. Dum la plej lastaj jaroj en Svedio virino eĉ fariĝis ĉefepiskopo. (En Svedio estas luterana eklezio.)

En 1927 vojaĝis ĵurnalisto el tutlanda sveda gazeto al Venecio. Tie li kompreneble aŭdis multajn belajn kantojn. Iu temis pri Sankta Luĉio. Kiam li revenis al Stokholmo li membris pri la malnovaj tradicioj, kiujn oni preskaŭ forgesis. Iu verkisto verkis belan poemon per malnovaj vortoj pri Sankta Luĉio, kiu portis lumon, varmon kaj eĉ manĝon al la homoj. La cirklo fermiĝas, Luĉio venas kun kafo kaj kukoj en la frumateno. Tio okazis en la hejmoj.

Sed nun ĉiu urbo kaj urbeto elektu per voĉdonado en la gazetoj belan junulinon, sed ŝi estu ankaŭ bonkora, helpema al homoj. Antaŭ decembro la legantoj de la urbaj gazetoj voĉdonis pri la urba Luĉio. Ŝi sidis en malnovspeca ĉaro, kiu estis tirata de ĉevalo.

Ŝiaj postsekvantinoj iris malantaŭ ĝi. Ili estis blanke vestitaj kun krono de tigoj el vakcinioj kaj kandeloj enmane. Oni kantis Luĉiokanton kaj plurajn aliajn Julokantojn. Ili kantis diversloke. Eble unue en la preĝejo, kie estis tute malhele kaj silente. La Luĉio kun siaj honorfraŭlinoj envenis kantantaj unue mallaŭte, poste pli kaj pli laŭte ĝis ili staris antaŭ la altaro. Tie ili faris sian programon kun diversaj Julokantoj. Estas tre kortuŝe sidi en la malhelo vidi kiel la preĝejo lumiĝas per la kandeloj kaj la kantado laŭtiĝas ju pli proksimiĝas la knabinoj. Ĉu estas tiel, ke la miljara preĝado por reveno de varmo kaj helo sukcesis?

La aro de junulinoj daŭrigis sian programon en malsanulejoj, en maljunulejoj. En renkontejoj por maljunuloj. Ĉie oni ankaŭ

trinkas kafon kaj manĝas Luĉiokukojn flavajn de safrano, kion eblas aĉeti nur antaŭ Julio!

Ĉu la multjara klopodo kaj preĝo kaj ofero al la diversaj dioj sukcesis en la fino doni lumon kaj ĝojon al la homoj? Dum postaj jaroj multaj organizoj aranĝas Luĉiofestojn dum siaj kunvenoj. Ankaŭ esperantoklubo havas Luĉiofestojn kaj kantas Luĉiokantojn en Esperanto. La lernejoj havas matenan Luĉiokantadon. En iu periodo oni havis Luĉiofeston matene en sia laborejo. Infanoj en infanvartejoj lernis kanti Luĉiokanton kaj iris al proksima maljunulejo por kanti. Divenu: Ĉu la maljunulinoj ploris pro kortuŝo kaj eble memoro pri kiam ŝi mem estis Luĉio? La gelernantoj en la matenoj vizitas siajn instruistojn, kantas kaj regalas ilin per kafo kaj kukoj. Ŝajnas ke tio ne plu estas tre populare. Mi aŭdis, ke nun la gelernantoj festas dum la nokto kaj poste iras en la mateno al la lecionoj de la lernejo. Verŝajne tre viglaj aŭskultantoj dum la lecionoj!

La Nobelfesto okazas en decembro. En la hoteloj kie loĝas la nobelpremiitoj envenas Luĉio kantante en la dormoĉambron de la premiito, kiu kelkfoje tre teruriĝis. Nun tio estas konata evento. Neniu plu timas. Luĉioaranĝoj kolektas monon por malriĉaj infanoj.

La vojaĝo al Venecio 1927 eble estis la plej sukcesa ago por doni lumon kaj varmon al la homoj. Estas ankaŭ interese ke tre malnova tradicio povas ŝanĝiĝi dum la paso de la tempo kaj trovi novajn vestojn por si. Nun oni ja ne bezonas la sunon por havi lumon. Sufiĉas premi sur butono kaj elektraj lampoj lumas anstataŭ la suno.

Mi pensas ke tiu ĉi tradicio kiu estas plektita de multaj fadenoj ekzistas nur en Svedio kaj inter svedoj en Finnlando.

Kerstin Rohdin verkis la rakonton en januaro 2021.

Teksto de Luĉiokanto

Sankta Luĉio en Nordo. Trad. Birger Viggen

Nokto mallumas ĉirkaŭ la domoj
Dormas trankvile bestoj kaj homoj
Tiam en frosta nord'
Staras ĉe nia pord'
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio.
Tiam en frosta nord'
Staras ĉe nia pord'
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio.

Kandelkronita sur blonda hararo
Kvazaŭ anĝelnatur' en la ombraro
En frumatena hor'
Venas la belsonor':

Sankta Luĉio, Sankta Luĉio.
En frumatena hor'
Venas la belsonor':
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio.

Lumoreĝino en blanka vesto,
La heroldino de la kristfestoj.
Portas al ĉiu dom'
Ĝojon al ĉiu hom'
Sankta Luĉio, ĉiela vizio.
Portas al ĉiu dom'
Ĝojon al ĉiu hom'
Sankta Luĉio, ĉiela vizio.

Esperantaj proverboj

trovitaj en Twitter de Inga
Johansson

Tro elektema ricevas nenion.
Kiu malmulte deziras, feliĉon akiras.
Pli bona estas vorto afabla, ol kuko agrabla.
Se vi donas mielon, donu ankaŭ kuleron.
Pli bona estas io, ol nenio.
Inter faro kaj rakonto staras meze granda monto.
Kritiki estas facile, fari malfacile.
Kiu aŭdis unuan, ankaŭ aŭdu la duan.
Fluis sur lipoj, sed en buŝon ne trafis.
Kiu ne riskas, tiu ne gajnas.



El <https://mobile.twitter.com/CiutagaProverbo>